

esperanto sub ————— LA SUDA KRUCO

ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

marto-aprilo 2008 • numero 92 volumo 16 - numero 2



Vizito al la Korea Kongreso de Esperanto (p.8)

ISSN 1038-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Nro 92 • Vol 16.2 • Marto-aprilo 2008

Redaktoro: Donald Broadribb

Eldonado:

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac. La programo uzita estas Mellel. La ĉeftiparo estas LM romana.

Abonoj kaj membreco:

Membreco en AEA (inkl. *ESK*-on) A\$40 (A\$25 por pensiuloj kaj studentoj). Pagu al la sekretario: <sekretario@esperanto.org.au>

Simpla abono al ESK sen membreco kostas A\$50. Pagu al Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio: <libroservo@esperanto.org.au>

Esperanto sub La Suda Krucio estas aŭtomate sendata al ĉiuj ordinaraj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur p. 31.

Esperanto sub la Suda Krucio

P.O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937

<esk@esperanto.org.au>

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Enhavo © 2008, AEA & NZEA kaj la individuaj verkintoj.

En ĉi tiu numero

Veturado al Brisbano (Kam Lee).....	3
Sukcesa Oceania Kongreso en Auckland (David Ryan).....	6
The AEA library has a new name! ..	8
Ĉu Koreo estas stranga (Sandor Horvath & Helen Palmer)	8
Vizito al Vjetnamo (Debra McCarney).....	11
Interesting Tidbits from Around the World.....	20
Ni pri ni, oni pri ni (Katja Steele) ..	22
Interrete	22
Listoj de utilindaj retajoj esperantaj Kiel trovi esperantolingvajn ret-paĝojn per Google; Detaloj pri LERNU! ; podkasto; videoj per YouTube; elibroj kaj kantoj esperantaj	
El la regionoj	24
Marcel Leereveld: Naŭdekjarulo (Franiska Toubale).....	24
Marcel Leereveld and the Esperanto Summer School in Adelaide 1989-1997 (Max Wearing).....	26
Forpasis Sylvia Burkitt (Margaret Chaldecott).....	27
Nekrologo — Frank Swift (Erin McGifford)	28
Ĉu vi deziras instrui en Ĉinio?	29
Esperanto Courses for Beginners ...	30
Nova renkontejo de la Torquay Esperanto Kafo Klubo.....	30

**Limdato por
la majo-junia numero de *ESK*:**
5a de aprilo 2008

Veturado al Brisbano de Kam Lee

Oktobron 2007, Andrew Lutz kaj mi ĉeestis ĉe la Aŭstralia Kongreso en Kvinslando. Ni iris tien aŭtomobile, ĉar estis bona oportuno viziti interesajn kaj belajn partojn de enlanda Aŭstralio laŭ la ĉefvojo Newel. La veturo inter Melburno kaj Brisbano ĉefe temas pri la hazarda vizito al Cootamundra, la planita vizito al Warrumbungles kaj iomete planita vizito al Siding Spring.

Trapasinte Wagga Wagga, ni intencis rapide trapasi tra Cootamundra kaj la aliaj urbetoj ĝis Oranĝo. Tamen, dum ni estis en Cootamundra, ni informiĝis, ke ĉi tiu loko estis la naskiĝloko de Donald Bradman. Apud la urbetcentro estis Jubileo-Parko, kiu enhavas interesan belan lokon, kiu nomiĝas “Promenejo de Kriketkapitanoj”.



Je Promenejo de Kriketkapitanoj, Cootamundra, NSK. Ludante kontraŭ la mondfama Donald Bradman. Kam Lee, ludante sentinelo vane rigardas dum Donald Bradman (almenaŭ statuo de li) frapegas la kriketpilkon al la ludejbordo por kvar poentoj.

Viditaj estis la metalaj bustoj de la Aŭstraliaj kriketkapitanoj, kiuj inkluzivis la nunan kapitanon Ricky

Ponting. La plej interesa artaĵo estis la statuo de Donald Bradman ludanta kiel batanto.

Ni iris al alia parto de la urbeto kaj ni trovis la domon, kie Donald Bradman naskiĝis. Ni eniris en la antaŭan parton de la interno de la ligna domo. Kiu vere antaŭvidis, ke en ĉi tiu konstruaĵo naskiĝos la plej fama Aŭstralia kriketisto?!



Kam Lee staranta antaŭ 89 Strato de Adams, Cootamundra, kiu estis la domo de juna Donald Bradman.

Dum la nokto, ni dormis en la domo de Esperantisto, Mary Mills en Oranĝo¹. Dum la sekva mateno, ni veturis al Warrumbungles, kiu estas proksimume 100 kilometrojn norde de Dubbo ≈ 300 km nordokcidente de Sidneo. Warrumbungle devenas el indigena vorto signifanta “malgrandaj montoj”. Dum la vizito, ni piediris laŭ piedvojetoj.

Laŭ geologia vidpunkto, antaŭ 17 milionoj da jaroj, la Warrumbungles estis vulkana loko. La vidindaj rokfor-

¹ Pli detala priskribo de vizito al Mary Mills kaj Oranĝo estis menciita en alia raporto aperinta en *ESK* januaro-februaro 2008.

4 | esperanto sub la suda kruco

macioj kiaj Belongery Spire kaj Crater Bluff antaŭe estas solidaj vulkanaj kamentuboj, kiuj antaŭe estis fonto de likva magmo por la formado de la vulkano. Periode, erupcio okazis, sed fine la vulkano mortis. Poste pro erozio, la relativa mola konuso malaperis kaj nun nur la malmola lava kamentubo restas.

La pantranĉilo (“Bread Knife”) estas geologia muro 90 metrojn alta kaj relative tre maldika. La rokformacio formiĝis pro likva magmo, kiu povas penetri en la fendojn de la tero. Poste la mola tero, ĉirkaŭ la mura-spekta malvarma solida magmo foriris pro Erozio.




Fotita ĉe la vizitista centro de la Naturparko Warrumbungles. La sega klingo de La Pantranĉilo videblas ĉe la malsupra dekstra kvarono de la bildo. Malantaŭe estas Apikaĵo de Kratero (Crater Bluff).

Post la piedekskurso, ni vizitis la Astronomian Observatorion Siding Spring kiu konsistas el kelkaj grandaj teleskopoj. La tri plej gravaj teleskopoj estas la teleskopoj 3.9-metra Angla-Aŭstralia, la 2.3-metra, kaj la 1.2-metra Schmidt. La Angla-Aŭstralia teleskopo estis oficiale inaŭgurita en 1973 kaj havas la duan plej grandan spegulan teleregon en la mondo. Enirinte en blankan kupulaspektan

konstruaĵon ni povas vidi la grandegan instrumenton el publika vidĉambro.



Ĉe Rigardejo de Blanka Eŭkalipto. (White Gum Look Out) Andrew Lutz staras antaŭ la “Skulptaĵgalerio de Warrumbungles”.



Pli detala bildo de la maldekstra flanko de la fono. Maldekstre estas Apikaĵo de Kratero, dekstre estas Konusturo de Belongery.

La tri astronomiaj vidiloj en Siding Spring kontribuas al la

a) Mapado de la Universo, ekz. La “Jarmila Katalogo”.

b) Esploro pri la formado de galaksioj similaj al nia, kaj aliaj aferoj.

Dum 2002, unu el la teleskopoj (2.3 m) estis uzita por la ektrovo de la stelo HE 0107-5240, kiu je ĉi tiu tempo estas la plej maljuna stelo konata en la Lakta Vojo.

La serĉado je eĉ pli maljunaj steloj en nia galaksio daŭras kaj dum frua 2007 ĉe alia observatorio okazis



La Angla-Aŭstralia 3.9-metro teleskopoj, rigardata el la publika vidĉambro.

scienca raporto pri stelo HE 1523-0901 kiu havas 13.4 miliardojn da jaroj. La science akceptita aĝo de la universo estas 13.7 miliardoj da jaroj. Post nia miregado pri la universo kaj la teleskopoj, ni faris la relative pli humilan taskon de daŭrigado de nia veturado. Ni haltis kaj vespemanĝis en Goondiwindi. Nia veturo

Ĉi tiu raporto ĉefe temas pri la vizitoj al lokoj kiujn ni vizitis antaŭ kaj post la vizito de Brisbane. □

daŭris kaj finfine dum la frua mateno de la nokto, ni jam estis ĉe Brisbane. Kia aventuro al nia celloko, ĉu ne?!



La granda blanka kupolo de la Angla-Aŭstralia 3.9-metra teleskopoj. Antaŭ ĝi staras Kam Lee.

La veturado estis sukcesa afero. Mi konkludas ke estas multaj vizitindaj lokoj laŭ la automobilaj ĉefvojoj inter Melburno kaj Brisbane. Mi ankaŭ devas menciigi mian veturamikon Andrew Lutz, pro lia varma amikeco, veturkapablo por veturi dum tre longaj distancoj, kaj interesaj veturkonversacioj

Ĉu lastateme vi aŭskultis esperanton?

Provu ĉe <http://www.3zzz.com.au/> kiam ajn dum la semajno, por aŭskulti nian esperantan radioprogramon. Premu la butonon ĉe la supro de la paĝo kaj elektu *Esperanto*.

Ĉu vi preferus legi *EPK*-on koloran?

Tio eblas. Nur necesas atentigi al <sekretario@esperanto.org.au> ke vi deziras ricevadi *EPK*-on per poŝto anstataŭ sur papere.

Sukcesa Oceania Kongreso en Auckland de David Ryan, Prezidanto de NZEA

La Oceania Kongreso (kuna kongreso de NZEA kaj AEA) en januaro estis ege granda sukceso.

Partoprenis 59 personoj, plejparte el Nov-Zelando kaj Aŭstralio, sed ankaŭ venis kongresanoj el Slovakio, Francio, Italio, Svedio, Malajzio, kaj ses el Nov-Kaledonio. Pro ĉi tiu nacia kaj lingva diverseco, la etoso estis vere internacia kaj oni vidis kiel Esperanto vere funkcias kiam personoj el diversaj gepatraj lingvoj sidas ĉe manĝotablo kaj interbabilas pri diversaj temoj. →

Aparte de la internacia etoso, la vetero ankaŭ estis tre agrabla kaj varma. La kongresejo estis komforta kaj plejmultaj kongresanoj restis tie.

Dum la kongreso okazis prelegoj, oficialaj kunvenoj de NZEA, kant-horoj, kvizo (kiun gajnis Trevor Steele), kaj kursoj preskaŭ ĉiutage. Dum libera vespero, kelkaj el la pli junaj kongresanoj eĉ vizitis trinkejojn (aŭ ĉu drinkejojn?) en la urbcentro.

Gvidantoj de la kursoj estis Stano Marček (redaktoro de *Esperanto el Slovakio*) kaj Trevor kaj Katja Steele el Adelaide. Trevor gvidis kursojn por progresintoj en kiuj oni studis lian novan libron *Kaj staros tre alte...* pri la ebla agado de Jesuo dum la periodo de lia vivo pri kiu la Sankta Biblio informas neniom.

Kongresanoj ankaŭ partoprenis en tri ekskuroj: al regiona parko kie oni povis promeni inter grandaj arboj kaj ĝui belan vidon, al bela kampara kaj marborda regiono norde de Auckland (kie kelkaj banis sin en la varma

mara akvo), kaj al tipa maoria kunveno kie kongresanoj ĝuis tre bongustan maorian manĝon.

Novaĵ lernantoj de Nov-Zelando kaj Nov-Kaledonio ĉeestis la kongreson, kio estis ĝojiga fakto, kvankam ne alvenis amaso da novaĵ Esperantistoj malgraŭ vasta reklamado. Tamen, granda propaganda sukceso estis du-minuta ero en la ĉefa novaĵ-programo de la ĉefa televida kanalo de Nov-Zelando, kiun vidis proksimume duona miliono da nov-zelandanoj, en kiu la Prezidantoj de NZEA kaj AEA estis intervjuitaj. La novaĵero estis pozitiva pri Esperanto kaj montris ankaŭ infanajn kongresanojn.

Dum la kuna kongreso, gesamideanoj el Nov-Zelando kaj Aŭstralio interkonatiĝis kaj diskutis agadon en ambaŭ landoj. Ĉi tiu kvina kuna kongreso formas parton de daŭra kunlaboro inter NZEA kaj AEA. Venontjare, ni esperas plu interŝanĝi ideojn kaj kunlabori pri diversaj aferoj. Ni ankaŭ esperas ke sufiĉe multe da Nov-Zelandanoj povos partopreni la venontjanuaran someran kurson en Sidnejo.

Specife pri NZEA, la Prezidanto raportis ke la ĉefa agado de NZEA dum 2007 estis la Oceania Kongreso kaj reklamado pri ĝi en Nov-Zelando kaj eksterlande. Pluraj personoj kontaktis NZEA por peti informojn pri Esperanto, sed novaĵ personoj ne membriĝis en NZEA. Laŭ la popolnombrado de 2006, 123 personoj en Nov-Zelando diras ke ili povas paroli Esperanton.

Koran dankon al la LKK pro bona organizado de la kongreso. Por mi, la kongreso elstaris pro la fakto ke oni povis vidi kiel vere funkcias Esperanto. Pro la ĉeesto de Esperantistoj el

diversaj mondpartoj, krokodili tute ne eblis. Eĉ 121 jarojn post la kreiĝo de Esperanto, personoj el multaj landoj kaj kulturoj ankoraŭ kunvenas en amikeco per unu sola lingvo.



La kongresejo



La kongresejo



Dum la malferma kunveno



2 prezidantoj: David Ryan (NZWA) & Igor Couto (AEA)



Oni manĝas



...kaj plu manĝas



La infanoj manĝas



Oni kantas



...kaj plu kantas



Oni staras



Kelkaj dormas, aliaj aŭskultas



Du el la eksterlandanoj

Fotoj el anonima raporto en Interreto. Fotinto ne nomita.

The AEA library has a new name!

The competition to select a name for our library (see ESK May-June 2007 & September-October 2007) has been won by Carol Lutz of Victoria with her entry:

The Esperanto Collection of Australia (Esperanto-Kolekto de Aŭstralio)

Congratulations to Carol, who receives a \$50 book coupon from the AEA Libroservo as her prize, and to all who have supported our contest. Your interest and support are greatly appreciated.

Barrie Cledsmith

AEA biblioteko havas novan nomon!

En la konkurso por elekti nian biblioteko-nomon (vidu *ESK* majo-junio 2007 & septembro-oktobro 2007) estas gajninta Carol Lutz el Viktorio per sia sugesto:

La Esperanto-Kolekto de Aŭstralio (Esperanto Collection of Australia)

Gratulojn al Carol, kiu ricevas Libroservo-kuponon kun la valoro \$50 kiel premion, kaj al ĉiuj subtenantoj de nia konkurso. Via intereso kaj subteno estas multe ŝatita.

Barrie Cledsmith

Ĉu Koreo estas stranga? de Sandor Horvath kaj Helen Palmer

Dum la 39-a KEA kongreso, Sandor Horvath kaj Helen Plamer el Aŭstralio dividis kelkajn el siaj impresoj pri vivo en Koreo. Sandor instruis dum unu jaro en Koreo. Lia edzino Helen vizitis lin dum tri monatoj. Jen kelkaj iliaj observoj de nia lando.

Unue ni vere volas substreki ke la sekvantaj observoj estas nur... simplaj observoj. Ni ne prezentas seriozan analizon, nur supraĵajn, malprofundajn observojn.

Nature, kiel eksterlandanoj ni aŭtomate komparas kaj nature pensas ke — ĝenerale — la “sistemoj” en nia lando estas pli bonaj.

Tamen, ni ne volas kritiki, nur observi ĉar nekomprenejoj ofte ŝajnas al ni strangaj. Ofte ni remarkis ke multaj aferoj fakte estas pli “bonaj” ol ĉe ni en Aŭstralio. Tamen ni pensas ke

meti la spegulon antaŭ la enlandanojn kaj defii ilin iomete ankaŭ estas nia devo. Ofte la Koreanoj demandas, kion ni pensas pri ili?

Vi verŝajne jam audis multe da tiuj komentoj de aliaj eksterlandanoj. Ni pardonpetas pri tio.

Spaco, popolo, montoj...

Antaŭ ol viziti — mi eltrovis kelkajn faktojn pri via lando. La loĝantaro estas 48.4 milionoj. Kaj ne estas granda lando kompare al la nia. (Preskaŭ 90oble pli malgranda ol Aŭstralio).

Kutime mi laboras ekstere en Aŭstralio — kun grandaj vidaĵoj, horizontoj, preskaŭ sen homoj! En multaj naciaj parkoj, la tero etendiĝas (ofte sen montoj) tiel for kiel la okuloj povas vidi.

En Koreo la popol-denso estas

proksimume po 480 homoj en kvadrata kilometro — unu el la plej grandaj en la mondo! En Aŭstralio la popol-denso estas nur po 2 en ĉiu kvadrata kilometro. 10.4 milionoj loĝas en Seulo, fakte = la duono de la tuta Aŭstralia loĝantaro.

Tial mi ne anatŭgis mian restadon en Koreo. Kia teruro! Aŭtomobiloj! Bruo! Homamasoj! Malbona aero! Konstruaĵoj ĉie.



Dum la korea kongreso

La montoj (kaj la montogrimpistoj)

Mi vere estas suprizita de la koreaj montoj! Ĉie estas videblaj montoj — do kiam mi estas en la apartamento de Sandor aŭ en lia oficejo — kaj mi sentas min iomete tro urbana — mi rigardas montojn tra la fenestro. Kaj la montoj estas plenaj de arbaroj.

La grandeco de ŝuoj

Miaj ŝuoj rompiĝis kaj mi decidis aĉeti novajn ŝuojn. Sed ne eblas (eĉ kun la kunula helpo de Sandor). Mi serĉis kaj serĉis en kelkaj ŝubutikoj sed ne trovis taŭgajn ŝuojn. Ĉiuj estas tro malgrandaj aŭ miaj piedoj es-

tas tro grandaj. Mi parolis poste kun germanino kaj ankaŭ ŝi konsentis kun mi kaj informis min ke ŝi devis aĉeti novajn ŝuojn per la reto(!)



Dum la korea kongreso

Fakte ĉi tie mi sentas min iomete giganta kompare al la koreinoj! Ankaŭ iomete mallerta — ĉar multaj estas ne nur pli malgrandaj sed ankaŭ pli graciaj kaj pli puraj ktp.

Ekzemple, kiam mi montogrimpis en la bela granda montaro de via Nacia Parko Jirisan, la vetero ne estis bona — fakte pluvis ĉiun tagon — ni marŝis dum tri tagoj. Je la fino de la tagoj ĉiun vesperon — mi regardis miajn ŝuojn, ŝtrumpojn, mian pantalonon, kaj ĉio estas malpura, plena de koto — sed kiam mi regardis la koreanajn vestaĵojn, preskau ĉio restis pura!? Eĉ la montogrimpistoj kun blankaj pantalonoj! Kiel eblas tio?

Plastaj pakaĵoj

Ŝajnas ke koreoj havas grandan deziron meti ne nur unu sed ofte tri tavolojn da pakajmaterialo ĉirkaŭ biskvitojn, kafon, eĉ fruktojn. Tamen estas bone, ke kelkfoje oni devas pagi por plasta sako en la butikoj.

Rizproduktoj

Nin tre impresis vidi, sperti kaj gust-

umi la grandan varion de rizproduktotaj. Rizo rizo rizo, kimbap, bibimpap, duk, soju, grandaj rizbiskvitoj...



Planko

Eĉ ĝis nun ni ne tute alkitimiĝis sidi sur la planko. Multaj koreoj preferas tion eĉ kiam ekzistas tabloj kun seĝoj en la sama ĉambro.

Akvo

Mi plu miras pri la akvo el krano jam ekde mia unua vizito en 2002. Ĉu eblas trinki ĝin? Multaj respondis ke jes. Tamen, ili mem ne trinkas kaj ĉiam aĉetas botelojn da akvo en la butikoj.

Batado en la lernejoj

Mi aŭdis ke oni ankoraŭ batas la lernantojn en la mez- kaj alt-lernejoj. Tamen estis granda ŝoko kiam mi vidis ĝin dum mia instruado de la germana en altlernejo. Ankaŭ vidante lernanton en la joga pozo de hundo, nur por eltrovi ke ili ne praktikas jogan, sed estis punataj, ĉar ili ludis per la klasĉambra komputilo dum la paŭzo.

Suneung (Universitata enirekzameno)

La 15-an de novembro ni leviĝis frumatene por sperti la alvenon de ekzamenontoj. Kia spektaklo! Kantoj. Ĉokoladoj. Policistoj. Zorgemaj gepat-

roj, ĉefe patrinoj.

Malrapide mi komprenas ke tiu ekzameno dominas la vivon ne nur de la lernantoj, sed ankaŭ de multaj familianoj.



En artlernejo

Kelkaj Koreoj substrekiĝis ke almenaŭ la ekzameno estas egala por ĉiu ... sed ĉu vere? Mi scias ke kelkaj gepatroj elspezas 1.5 milionojn da Won ĉiun monaton por kromstudo. Preskaŭ mia monata salajro. Tutcerte multaj ne havas tiujn sumojn.

Speguloj — ĉie

Ni vidas spegulojn preskaŭ ĉie, en ĉiu domo, klasĉambro, enirejoj, elirejoj, koridoroj, kaj homoj vere uzas ilin pli ofte ol ĉe ni. Estus interese eltrovi la kialon.

Ni volas ankaŭ uzi ĉi oportunon por dankegi ĉiujn esperantistojn en Koreo kiuj gastigis nin, regalis nin, babilis kun ni, amikiĝis kun ni, klarigis al ni, vojaĝis kun ni. Vi vere estas la homoj kiuj faris nian restadon tre speciala kaj memorebla.

Multajn dankojn Amelano, Arb-ara, Dianto, Fonto, Iela, Leono, Mondego, Onklo, Perla, Plena, Ŝlosilo, Urso

Mi restos membro de KEA kaj ni esperas ke ni povos redoni iam vian malavaran gastamecon almenaŭ al kelkaj el vi en Aŭstralio. □

Vizito al Vjetnamo

Decembro 2007/Januaro 2008

de Debra McCarney

Post mia unua vizito al Vjetnamo en 2004 mi ĉiam revis pri rea vizito kaj tiu revo plenumiĝis en decembro 2007. Mi ricevis invitleteron de vjetnama junulino kiun mi ekkonis dum mia unua vizito. Ni ofte rete komuniĝis post tio kaj mi helpis ŝin je ŝia studado de la angla lingvo. Ŝi celis iĝi instruistino de la angla en Vjetnamo kaj ŝi diligente studis. Post sukcesoplena licenciĝo de ŝia kolegio ŝi estis akceptita kiel helpanto en loĝejo por handikapuloj en Calgary, Kanado. Estante ege bonkora junulino, ŝi ĝojis ne nur ĉar ŝi havas la eblecon plibonigi sian konon de la angla, sed ankaŭ ĉar tre plaĉas al ŝi helpi personojn kun bezonoj. Tie en Kanado ŝi renkontis la junulon kiu iĝos ŝia edzo, kaj pro tiu renkonto mi ricevis invitleteron ĉeesti geedziĝfeston en Vung Tau, Vjetnamo.

La alflugo

Por ŝpari monon mi decidis provi la novan malmultekostan fluginion Tiger Airways. Mi aĉetis bileton de Perto al Singapuro kaj alian de Singapuro al Ho Chi Minh Urbo. La flugo de Perto alvenis Singapuron je la 3a matene sed mia sekva flugo ne forlasis tiun urbon antaŭ la tagmezo, do mi kontaktis la flughavenon por lui dormoĉambrom en la Transit-hotelo. Ho ve! Venis la respondo ke la malmultekosta flugstacio, kie alvenas la aviadiloj de Tiger Airways, ne estas konektita kun la aliaj flugstacioj do

ne eblas tranokti en tiu hotelo. Oni proponis al mi multe pli multekostajn alternativojn, do mi rezignis al nokto en la flugstacio mem. Tamen, kiam mi alvenis mi konstatis ke estas preskaŭ nenio en tiu flugstacio kaj mi tute ne povis elteni 9 horojn en ĝi.

En Singapuro

Mi decidis lasi mian valizon en la gardopakaĵejo kaj iri esplori Singapuron. Unue la gardisto ne povis kompreni ke mi nur volas lasi mian valizon dum kelkaj horoj. Li volis pagigi min por du tagoj! Post disputoj kun 3 gardistoj, ili finfine komprenis, faris la bezonatajn fotokopiojn de mia pasporto, plenumis la paperojn kaj mi estis preta malkovri Singapuron ... je la 4:30 matene.

Mi iris aŭtobuse al Flugstacio 1, sed ne estis multe por vidi tie, precipe je tiu horo de la mateno. Ĉiu butikoj estis fermita. La "Ĉieltrajno" ne komenciĝas ĝis la 5:00, do mi decidis piediri al Flugstacio 2, je distanco de 500 metroj. Tie mi trovis iom pli da vivo, kelkajn kafejojn malfermitajn, pli da homoj. Mi promenadis, trinkis teon kun kuketo, kaj preterpasigis tempon ĝis la 8:00 kiam mi povis fari viziton al "Little India" en senpaga aŭtobuso. Tiu vojaĝo inkluzivis senpagan matenmanĝon en hinda vegetarana restoracio. Mi povis pasigi nur unu horon tie antaŭ ol reiri al la flughaveno por trafi mian sekvan flugon,

sed almenaŭ mi gustumis hincan ma-
tenmanĝon kaj fotis hincan templon.

Antaŭen, al Vjetnamo

Mi estis tiom laca ke mi ekdormis sur seĝo en la malaltekosta flugstacio kaj preskaŭ maltrafis mian flugon, sed bonŝance mi vekigis ĝuste kiam la homoj estis enirantaj la aviadilon kaj mi kuris por enviciĝi. Baldaŭ mi estos ree en Vjetnamo!

Mi rigardis la vizaĝojn en la homamaso antaŭ mi ĉe la flughaveno de Ho Chi Minh Urbo kaj tuj rekonis esperantistino de mia unua vizito — F-ino Dao Mai Anh. Mi skribis al ŝi antaŭe por avizi ŝin pri mia vizito, kaj jen ŝi kun kelkaj amikinoj, inter ili S-ino Nga, S-ino Ngoc kaj S-ino Kim. Ŝi elkore bonvenigis min kaj ni ĉiuj iris per taksio al la domo de alia esperantistino, S-ino Ora. Ŝia domo troviĝas super apoteko kaj oni eniras tra la apoteko mem. La unua demando estis ege bonvena: “Ĉu vi volas dormi iomete?” Ho jes, mi estis tiom laca pro manko de dormado dum la nokto! S-ino Ora montris al mi gastokambron kaj mi dormis unu horon aŭ pli.

Kristnasko vjetnama!

Poste mi feliĉe manĝis tropikajn fruktojn kun la virinaro antaŭ ol ni ekis ekskurson vidi la urbocentron sub la ĉieaj kristnaskaj lumoj. Por lando kiu ne oficiale festas kristnaskon, la lumoj estis eksterordinare belaj. Kristnaskaj arboj kaj Patroj Kristnaskaj ankaŭ videblis ĉie, kaj multaj vjetnamanoj volis esti fotitaj antaŭ ili. Je la 10:30 vespere ni reiris per taksio al la flughaveno kie mia vjetnama amikino, Mai, atendis min.

Mi adiaŭis miajn esperantistajn amikinojn kaj promesis kontakti ilin se mi estos denove en Ho Chi Minh Urbo antaŭ mia reiro hejmen al Aŭstralio.

Vung Tau

Mai ĝoje prezentis al mi sian fianĉon el Kanado, Jeremie. Li estis ridetema kaj trankvila kaj mia tuja impresio estis de bonkora junulo. Ŝi ankaŭ prezentis sian patron, Thanh, kiu varme manpremis min kaj vjetnamlingve bonvenigis min al sia lando. Mai tradukis dum ni konversaciis atendantante la alvenon de la 4 gefratoj de Jeremie. Estis noktomeze kiam ĉiuj estis alvenintaj kaj ni povis komenci la vojaĝon per luita buseto al Vung Tau. Mai kaj mi tuj ekdormis kaj ne vekigis ĝis nia alveno al nia hotelo, sed la kanadanoj estis scivolemaj pri ĉio kaj miris pri la frenezeco de la trafiko eĉ je tiu malfrua horo.

Dum la sekvaj 4 tagoj antaŭ la geedziĝo, ni kune esploris la urbon Vung Tau kun ties grandega statuo de Jesuo kiu staras sur monteto kaj superrigardas la ĉirkaŭaĵojn. Mai kaj Jeremie akompanis nin kiam ili povis, sed ofte ili estis okupataj pri geedziĝfotadoj aŭ vidbendoj, ĉar multaj estas faritaj antaŭ la geedziĝo mem. La gefratoj, kiuj nomiĝis Gaston, François, Natalie kaj Angèle, ege interesiĝis pri ĉio. Natalie antaŭe vizitis Ĉadion en Okcident-Afriko kun kristana grupo, sed la aliaj neniam iris pli for de sia hejmlando ol al Usono. La familio kaj parencoj de Mai estis nekredeble gastemaj kaj bonkoraj. Ĉiun tagon ni ricevis invitojn manĝi kun ili — matenmanĝo en interesaj restoracioj, tagmanĝo en la domo de la gepatroj aŭ la onklo de Mai, kaj ofte vesper-

manĝo denove enhejme. Plejofte ni manĝis tiom multe dum la tago ke neniu kredis sin kapabla manĝi pli vespere, sed kiam la manĝaĵo alvenis ĝi estis ĉiam tiom bongusta ke la apetitoj revenis. Mi ne estas konata pro granda apetito, sed en Vung Tau mi ne povis rezisti gustumi ĉion.



La geezdiĝtago

La 29an de decembro estis la tago de la geezdiĝfestoj. Frumatene amikinoj de Hoa, la patrino de Mai, venis al nia hotelo kaj aranĝis la metalajn donackuvojn kiujn la fratoj de Jeremie kaj aliaj junuloj devis porti al la familio de Mai. En la kuvoj troviĝis bele aranĝitaj fruktoj kaj manĝaĵoj, cigaredoj kaj en unu korbo kuirita kokino, sen plumoj sed ankoraŭ kun sia kapo! Ĝi kuŝis sur lito de ruĝkolora glurizo kaj portis ruĝan rozon en sia beko. La junuloj prenis la 6 kuvojn kaj la procesio komenciĝis. Ni piediris unu post la alia, unue la kuvportantoj, due Jeremie en blua silka robo de antikva imperiestro, kaj fine la kanadaninoj kaj mi. Mi mem surportis tradician robon de Vjetnamo, la 'ao dai' (ao zai), kiu estis donacita al mi de Hoa. La lokanoj rigardis mire kaj ridis al la nekutima procesio, sed ni fiere piediris tra la stratoj ĝis la

domo de la gepatroj de Mai. Tie ŝia granda familio — multaj parencoj venis el nordaj regionoj — atendis nin. Por ricevi la donackuvojn antaŭen paŝis 6 junulinoj, ĉiuj vestitaj en rozkoloraj 'ao dai'. Ili ceremonie prenis la kuvojn kaj eniris la domon. Post tio ni ankaŭ eniris la malgrandan salonon, kie Mai atendis kun siaj gepatroj, geavoj, kaj aliaj plej proksimaj parencoj. Ŝi estis ege bele vestita en ruĝkolora 'ao dai' kaj ruĝa ĉapelo. Dum la ceremonio, krom la interŝanĝo de ringoj inter la novedzino kaj novedzo, aliaj parencoj donacas ringojn aŭ aliajn juvelojn al ŝi. Hoa invitis min donaci orelingojn kune kun ŝi. Mi devis enmeti unu orelingon en unu orellobon, dum Hoa faris la samon en la alian. Mi antaŭe neniam metis orelingon en la orellobon de alia persono kaj mi ege timis ke mi dolorigos ŝin, krome pro miaj okulvitroj mi ne povis bone vidi do miaj manoj iomete tremis, sed post kelkaj longegaj sekundoj mi sukcesis. Mi sciis ke estas vera honoro partopreni la ceremonion, do mi ne volis fiaski!

Geedziĝfestoj por 500

Kutime, post la familia ceremonio en la domo de la gepatroj de la novedzino, samo okazas en la domo de la gepatroj de la novedzo. En tiu ĉi kazo oni aranĝis pli simplan aferon kaj ni iris rekte al la restoracio en la Majestic Towers Hotelo por la geedziĝfestoj. Nu, mi diras 'rekte', sed fakte ni estis en luita aŭtobuso kiu sekvis la blankan aŭton ornamitan per ruĝaj floroj de la geedziĝparo, dum ĝi rondiris ŝajne la tutan urbon survoje al la hotelo.

Ĉe la geedziĝfesto estis 500 invitaj gastoj — parencoj kaj geamikoj de la gepatroj de Mai. La manĝoĉambro estis vasta kun vera armeo de geservantoj, pli ol unu por ĉiu tablo. La festo ne tuj komenciĝis.



Unue Mai kaj Jeremie devis surmeti aliajn vestojn — blankan, okcidentan robon por Mai kaj blankan kompletan por Jeremie. Tiam viciĝis la homoj kiuj volis esti fotitaj kun la nove geedzigitaj paro. Tio estis longdaŭra afero, certe pli ol unu horo, sed fine ni ĉiuj sidis en la manĝoĉambro kaj muziko anoncis la alveno de la novedza procesio — Mai kaj Jeremie, kun aro de junulinoj vestitaj blanke. Ili suriris malgrandan podion je la antaŭa parto de la ĉambro kaj subite arĝentaj paperetoj pluvetis sur ilin kaj la ĉeestantaro aplaudis laŭte.

Poste la gepatroj de Mai kaj la gefratoj de Jeremie procesie eniris kaj suriris la podion. La junulinoj malaperis, la novvenintoj prenis iliajn lokojn, kaj la paperetoj pluvetis denove. Mai kaj Jeremie tranĉis la supran nivelon de la 5-etaĝa geedziĝkuko, la nura vera kuka nivelo, kaj tiam aperis du junuloj belege vestitaj en blankaj

kompletoj. Ili marŝis ceremonie sur la podio kaj turnis sin al la ĉeestantaro kun boteloj de ĉampano enmane.



La scintilantaj paperpecetoj

Ritme ili provis malfermi la botelojn kune, sed bedaŭrinde unu ne sukcesis. Li devis batali kontraŭ la botelo ĝis finfine ĝi lasis la korkon fali silente al la planko. La ĉeestantaro tamen laŭte aplaudis. La botelojn ricevis Mai kaj Jeremie kaj ili komencis verŝi la ĉampanon sur piramidon de ĝlasoj. La likvaĵo fluis de unu ĝlaso al alia, elĵetante rozkoloran ŝaŭmon. La bildo estis belega. Post tio la gepatroj, la gefratoj kaj la novedzoj tostis unu la aliajn kaj la manĝado komenciĝis. Ĝi konsistis el 7 pladoj, sed ne tro grandaj, do nur sufiĉe por ke ĉiu gustumu iomete de ĉio.

Ĉe mia tablo sidis la 4 kanadanoj kaj kelkaj parencoj de Mai, el kiuj unu sufiĉe bone parolis la anglan ĉar li instruas ĝin. Li estis ege afabla kaj klarigis multon pri la ceremonio kaj la kutimoj en Vjetnamo. Ni ankaŭ havis interesan diskuton pri la neceso prizorgi etnajn kaj minoritatajn lingvojn.

Post la festo

Post la manĝo, la plejmulto tuj eliris kaj malaperis. La kanadanoj kaj mi

trovis tion ege stranga. Ni atendis iom da konversacio, muziko, eble danĉado, sed ne. Ŝajnas ke tio ne okazas ĉe vjetnamaj gegeedziĝfestoj. Ja estis muziko kaj kantado dum la manĝado mem, sed ne poste — nur alia surmeto de vestoj por la geedziĝparo kaj pli da fotoj kun la parencoj kiuj restis. Post tio, denove en la aŭtobuso ĝis nia hotelo kaj ripozo. Estis longa kaj interesega tago, sed ni ĉiuj bezonis ripozon, precipe la novgeedzaj!

Vespere ni denove vizitis la domon de la onklo de Mai, kaj tie ili disdonis la geedziĝkukon. Ĝi estis speco de spongortoto kaj bongusta. La onklo ankaŭ disdonis konjakon kaj ni tostis la geedzojn per tio. Jeremie tiom ŝatis la konjakon ke la onklo donis mezbotelon al li. Ni ĉiuj ŝercis ke li tuj post la geedziĝo komencis drinki kaj Mai ridis.

Ree en Urbo Ho Chi Min

La sekvan tagon ni kortuŝe adiaŭis la familion de Mai kaj reiris al Urbo Ho Chi Minh. La gefratoj de Jeremie devis reiri al Kanado tiun nokton, do ni havis nian lastan vespermanĝon kune — Mai kaj Jeremie, la gefratoj kaj mi. Estis vespero plena je ridoj, memoroj kaj promesoj gardi kontakton unu kun la aliaj — dankon al “Facebook”. Ni ĉiuj ripozis en hotelo tiun nokton kaj kiam mi vekigis matene nur Mai kaj Jeremie restis. La aliaj estis hejmenflugintaj. Tiam estis ankaŭ mia vico adiaŭi al Mai kaj Jeremie, ĉar ili devis ĉeesti intervjuojn por akiri vizon por Mai, kaj poste iri al Dalat, la plej preferatan lokon de vjetnamanoj por pasigi la mielmonaton. Mi decidis pasigi la lastajn tag-

ojn de mia vizito en Urbo Ho Chi Minh, kie mi esperis renkonti miajn esperantistajn geamikojn.

Trafikkaoso

Mi telefonis al Mai Anh kaj klarigis kie mi estas. Ŝi petis min iri en taksio al ŝia adreso, do mi faris tion. Tiam mi konstatis ke mia hotelo, kvankam proksima al la flughaveno, estis iom for de la urbocentro kaj ankaŭ de la domo de Mai Anh. La trafiko estis terura, miloj da motorcikloj intermiksitaj kun kamionoj, aŭtoj, bicikloj kaj piedirantoj. La taksio ofte devis halti ĉe krucovoj kaj mi vidis la koston sur la montrilo altiĝi. Venontafoje mi iros per motorciklo, mi decidis. Je unu krucovojo la trafiko tute ne povis moviĝi kaj de ie policistoj alvenis kaj klopodis meti ordon en tiun situacion. Bonŝance mia taksio sukcesis rampi ĉirkaŭ la aliaj veturiloj kaj ni finfine atingis la domon de Mai Anh, kie ŝi ŝajne longe atendis min. Post taso de la ĉiea vjetnama teo ni eniris aŭtobuson kaj elbusiĝis ĉe la urbocentro.

Surpiede

Mi volis aĉeti novan poŝtelefonon do Mai Anh kondukis min al superbazaro por teknikaĵoj. Kun nova *Nokia* enmane ni tiam piediris tra la stratoj celante poŝtoŝtacion. Kiam ni trovis unu mi lernis la vjetnaman vorton por “poŝtoŝtacio” kaj konstatis ke fakte mi jam vidis ilin ĉie. Mi nur ne rekonis ilin per la vjetnama nomo. Mi sendis miajn belajn vjetnamajn novjarajn kartojn al familianoj alilande kaj ni pasigis la posttagmezon vizitante lokojn kiel la katedralo Notre Dame kaj la ĉefpoŝtoŝtacio,

ambaŭ konstruitaj de la francoj. Tiu tago estis la 31a de decembro kaj mi intencis atendi ĝis la noktomezo por festi la Novjaron en Urbo Ho Chi Minh kun miloj da vjetnamanoj, sed antaŭ la 10:00 vespere mi estis jam ege laca kaj Mai Anh same. Mi decidis reiri al mia hotelo. Kiam 2008 komenciĝis mi estis dormanta kvazaŭ bebo en mia hotelĉambro.

La nova jaro

La unua de januaro trovis min en buseto. Mi decidis fari rondestkurson al la vidindaj lokoj en Urbo Ho Chi Minh kun la turistokompanio Sinh Cafe. Ni estis malgranda grupo da turistoj de multaj malsamaj landoj — Japanio, Francio, eĉ vjetnamanoj de aliaj regionoj (aŭ eble alilande). Matene ni vizitis budhisman templon kaj ĉinan templon kaj iomete piediris en la ĉina parto de la urbo. Mi estis kontenta spiri la klimatizitan aeron en la buseto post la poluado fare de la motorcikloj dum la promenado en la urbocentro la tagon antaŭan. Posttagmeze la ĉiĉerono klarigis al ni pri la historio de la Palaco de Reunuiĝo kaj ni trarigardis la ĉambrojn kie la suda registaro ricevis internaciajn gastojn kaj faris decidojn pri militaj aferoj dum la milita periodo. Ni ankaŭ vizitis muzeon de militmemoraĵoj, lokon kiun mi fakte ne vere volis viziti pro la teruraj fotoj de la suferego de la vjetnama popolo, sed mi agnoskas ke gravas ke homoj ne forgesu aŭ malgrandigu tiun suferon por ne kaŭzi pli da insulto.

Mi revenis al mia hotelo post la ekskurso kaj tie ricevis viziton de Mai Anh kaj S-ino Ora. Ili venis per motorciklo kaj iris al restoracio ves-

permanĝi kun mi. Post interesa vespero da konversacio ili motorciklis hejmen kaj mi ege bone dormis.

Sandaloj...

La sekvan tagon mi translokiĝis al alia hotelo pli proksima al la urbocentro, kie estis pli facile por esperantistoj viziti min. Tiu hotelo estas en la turista kvartalo, do aŭdiĝis voĉoj en la franca, la germana, la hispana, eĉ la itala. La restoracioj celis turistojn, do ili ofertis okcidentajn manĝaĵojn krom la vjetnaman. Mi devis serĉi por trovi restoracion kie oni ofertis la vjetnaman teon. Laŭ mi la gusto ne estas tute bona, sed ĝi ege efikas por la sanstato de la stomako kaj mi kiel eble plej ofte trinkis ĝin. Post mia translokiĝo mi esploris tiun lokon kaj alvenis ĉe la ĉefbazaro.

Tie mi decidis aĉeti sandalojn, ĉar tiuj aĉetitaĵoj de mi dum mia unua vizito jam estis tro malnovaj. Mi trovis tiujn kiujn mi volis aĉeti kaj marĉandis pri la prezo. Tuj kiam ni interkonsentis, la vendistino demandis, “Kiom da paroj?”, kaj mi ridis pro ŝia lerteco. Mi decidis ludi ŝian ludon kaj mi aĉetis du parojn.

S-ro Ngoc & Ho Chi Minh

Kiam mi revenis al mia hotelo estis mesaĝo ke S-ro Ngoc baldaŭ kontaktos min. Mi rigardis iom da televido dum mi atendis kaj estis surprizita pro la interesaj programoj en kanalo Australia Network. Multaj el ili temis pri lokoj aŭ novaĵoj de aziaj landoj kaj mi bedaŭras ke ni ne povas rigardi pli da ili en Aŭstralio mem.

S-ro Ngoc venis motorcikle kaj veturigis min al sia domo kie mi konatiĝis kun lia edzino. Bedaŭrinde ŝi

ne parolas Esperanton, sed S-ro Ngoc tradukis por ke ni povu iomete konversacii.

S-ro Ngoc estas pentristo jam de multaj jaroj kaj montris al mi multajn pentraĵojn siajn kiujn li havas en sia multetaĝa domo. Mi miris kaj enviis lian talenton. Lastatempe li ekspoziciis en Urbo Ho Chi Minh. Multaj el liaj pentraĵoj spegulas liajn restadojn en pluraj landoj dum sia vivo, landoj kiel Rusio kaj Japanio kaj eĉ Aŭstralio.

Li parolis al mi pri Onklo Ho (Ho Chi Minh) kaj klarigis ke li scipovis Esperanton. S-ro Ngoc interesiĝis pri tio kaj faris esploradojn. Li verkis artikolon pri la rezulto de siaj esploroj kaj donis kopion al mi. Mi legis ĝin poste en mia hotelĉambro kaj ĝi montras ke Onklo Ho ne nur estis bone edukita kaj inteligenta, sed ke li rekonis la valoron de la internacia lingvo. Kiam li ricevis vizitantojn el Pollando kiuj scipovis Esperanton li uzis ĝin konversacie kun ili.

Lasta etapo

La 3an de januaro mi uzis ĉefe por iomete ripozi ĉar mi sentis la komencon de malvarmumo, sed mi ankaŭ vizitis S-inon Thien Thu. Ŝi gastigis min dum mia unua vizito al Vjetnamo, sed ĉifoje ŝi estis for en Hue kaj Nha Trang kiam mi alvenis. Estis plezuro renkonti ŝin en ŝia domo. Mai Anh kaj Nga ankaŭ venis kaj ni kune tagmanĝis kaj konversaciis. Thien Thu proponis ke la sekvan tagon ni faru ekskurson al termo-fonto kiu troviĝas en la provinco Vung Tau kaj Mai Anh klarigis ke ŝi jam telefonis

kelkajn eventualajn ekskursontojn. Se la nombro sufiĉos ni iros kune en luita buseto kun ŝoforo. Finfine ni nombris 8, do ĝi estis aranĝita.

Je la 6:30 matene mi atendis la buseton ekster mia hotelo kun unu el la ekskursantoj, Mai. Ni kune trinkis teon kaj baldaŭ la buseto alvenis, jam kun Thien Thu, Mai Anh kaj Nga. Ni atendis iomete kaj 2 gejunuloj alvenis. F-ino Minh Nguyet esperantist-igis antaŭ kelkaj jaroj kaj estas komitatano de VEJO. La ridetema Hoa estas junulo kiu studas informadikon kaj estas komencanto. Tiam ni kolektis S-ro Ngoc kaj ekis. Ekster Urbo Ho Chi Minh ni haltis por matenmanĝi — *“pho”* la plej komuna matenmanĝo de Vjetnamo — supo de bovaĵo aŭ kokinaĵo kun nudeloj. Oni ankaŭ prenas verdaĵojn de telero sur la tablo kaj enmetas ilin en la supon. La tuto estas ege bongusta kaj nutra.

La sekva halto estis ĉe belega plaĝo, preskaŭ sen homoj — tre nekutima sperto en Vjetnamo! Ni promenadis sur la sablo, metis niajn piedojn en la varman maron kaj ĝuis la trankvilecon. Duonhoron poste ni atingis la termo-fonton kiu ankaŭ estis ege trankvila loko. Pluraj piedbanoj invitas sidi kun piedoj en 37C-akvo, aŭ oni ankaŭ povas tute bani sin, kiel Nga kaj Mai elektis fari. Thien Thu provizis grandan piknikon al ĉiuj kaj poste ni promenadis, fotis la belajn florojn aŭ ripozis ĉe la piedbano. S-ro Ngoc ne volis perdi eblon skizi portretojn, do li skizis la junulinon Nga kaj min. Kiam ni revenis al Urbo Ho Chi Minh jam estis post la 7:30 vespere, do pli ol 12 horoj da ekskurso, bona metodo adiaŭi miajn geamikojn en Vjetnamo ĉar tiu estis mia lasta

tago. La 5an de januaro, je la 5a matene mi lasis mian hotelon kaj adiaŭis kaj Urbon Ho Chi Minh kaj Vjetna-

mon. Ĝis la venonta fojo — iam en la estonteco! □

.....

Rakonto el Esperantujo — Ĝinano, Ĉinujo de Ivan Heldzingen

Jam de longe estis por mi revo iri por labori en Ĉinujo, do, emeritigita de Telstra, mi membrigi en kursojn kaj finfine mi ricevis kvalifikojn por instruado de la lingvo angla al plenkreskuloj.

Preskaŭ tuj mi ricevis postenon de Victoria University por instrui al iliaj diplomo-studentoj en la universitato de konstruado kaj arkitekturo de Ŝandongo (Shandong Jianzhu Daxue), kiu situas en Ĝinano (Jinan). Ĝinano estas la ĉefurbo de la provinco Ŝandongo, ĉe la suda flanko de Flava Rivero (Huang He).

Ŝandongo situas ambaŭflanke de Flava Rivero, kaj pro tio ĝia tero estas fekundega. Ĉirkaŭ duoble pli granda ol Tasmanio, Ŝandongo havas preskaŭ 100 milionojn da enloĝantoj. Dum vojaĝo vagonara oni rimarkas, ke la nordaĉina ebenejo etendiĝas ĉien kvazaŭ grandega legomĝardeno. Krom havi la plej faman monton de Ĉinujo, Monto Taj vizitita de Konfuceo, ĝia marbordo estas belega, kun bildosimilaj urboj kiaj Jantaj (Yantai), Ŭejhaj (Weihai) kaj Ĉingdao (Qingdao). Qingdao gastigos la velboatadon dum la 2008aj Olimpikoj, kaj la Ŝandonganoj tre fieras pri tio.

La programo de Victoria University havas 132 studentojn kaj mi respondecis pri duono da ili en du klasoj po 33 homoj. Ili ĉiuj fieris esti “*freŝ-*


uloj”¹ laŭ la usona sistemo. Tri aliaj aŭstraliaj instruistoj inkluzive de unu “*ordiganto*” konsistigis la teamon de “denaskaj” angleparolantaj instruistoj.

Dum mia dua periodo en Ĝinan, pro tio ke mi ofte menciis Esperanton, iu menciis, ke vicdekano de la fremd-lingva fako estas esperantistino, do mi donis al li permeson ke ni kontaktu unu la alian. Post nelonge, ĉarma sinjorino Ami Zou kontaktis min kaj ni konstatis ke ni estas preskaŭ najbaroj en la malnova kampuso.

De tiam kiam ni renkontiĝis, Ami montras sian bonkorecon al mi kaj al miaj aŭstraliaj kunlaborantoj. Ekzemple, ŝi invitis nin al bankedo gastigita de firmao en kiu ŝia plej juna filino laboras. Tiu firmao reklamas tra tuta Ĉinujo, perbicikle!

La plej granda plezuro por mi, tamen, estis gastigi en la hejmo de profesoro Liu, de Normala Universitato Ŝandongo. Vojaĝi de nia loĝejo al la domo de Prof. Liu necesigis aŭtobusvojaĝon de horo kaj poste 15 minutan vojaĝon en la bone uzata aŭto de sinjoro Huang.

Venis al tiu ĝoja kunveno sep lokaj esperantistoj, kiuj regalis min laŭ la tradicia ĉina maniero, tiel ke mi ne povis manĝi kaj trinki ĉion ofertitan! Tamen ni ĉiuj kantis plenvoĉe “La Es-

.....
1 T.e. unuajaruloj. — 

pero” kaj Helo ankaŭ forte kaj plaĉe kantis “Abio vi”, bela kristnaska kanto.

Prof. Liu invitis min prelegi en Esperanto, al lia klaso en Universitato Normala Ŝandongo. Kun ĝojo mi akceptis, kaj post kelkaj tagoj Helo refoje montris sian ŝoforkapablon; fakte li senspirigis min, dum li serpentumigis sian iom kadukan tamen fidindan aŭteton tra la senfinaj stratoj de tiu urbego. Finfine ni venis al ia superbazaraspekta loko kie mi rimarkis la esperantistojn kiujn mi renkontis ĉe la hejmo de Profesoro Liu.



“Helo” en esperanto

Ni iris al ĉinstila rapid-prepara manĝejo, kie Profesoro Wang prezentis al mi du ekzemplerojn de sia libro. Unu por mi kaj la alia por la Melburna Esperanto-Asocio. Profesoro Wang, kvankam emerita, estis kirurgo sed ankaŭ bone konata artisto, lia libro prezentas liajn verkaĵojn, ĉefe pentraĵojn kaj statuojn el ligno. Profesoro Liu donis al mi ekzempleron de Esperanto-lernolibro kaj vortaro kiujn li mem verkis.

Dum ni manĝis ni konsentis ke la temo de mia prelego estu plejparte pri Aŭstralio kaj miaj impresoj pri Ĉinujo. Iomete mi parolu pri la kore-

lativoj kaj la demanda vorto “ĉu”, por ke la studentoj kuraĝiĝu fari demandojn. Je la ĝusta horo, ni promenis al la universitato, kaj eniris klasĉambron, en kiu sidis ĉirkaŭ kvardek studentoj.

Vere, en tiu parto de Ĉinujo, oni malofte vidas “okcidentulojn”, ĉar aŭdeblis “eh!” kiam mi staris apud profesoro Liu antaŭ la studentoj, kaj ili montris grandan scivolemon kaj plezuron per siaj ridetoj. Post tre afabla, eĉ flata enkonduko fare de la bona profesoro, mi salutis ilin nome de la aŭstraliaj kaj melburnaj Esperantistoj, kaj kun kredo en la mano komencis pridemandi ilian konon de la demandovortoj en Esperanto. Mi eĉ provis imponi ilin per mia (tre malka) kono de la ĉina skribmaniero, ĉar mi skribis “ĉu/ma” (ĉina skribosigno), “kiu/shei”, “kie/zai nar” kaj aliajn. Poste mi petis ilin laŭvice fari demandojn al mi pri io ajn, kaj mi uzis kaj mian esperanton kaj mian ĉinan lingvon por respondi.

Fakte la tempo iris tiom rapide ke horo konsumiĝis! Profesoro Liu flirtigis botelon da akvo por sciigi ke venis tempo por paŭzi. Dum la paŭzo mi parolis kun la studentoj, kaj la nivelo de esperanto estis kun ĉiuj ja bona. Ĉar prof. Liu estas profesoro de la franca lingvo, multaj tiuj studentoj ankaŭ studas la francan. Aliaj lingvoj studataj estas la angla (kompreneble), japana, korea kaj germana.

Kvankam oni invitis min reveni, mi fakte ne havis bonan oportunon ĉar tiam venos la ekzamentempo por miaj propraj studentoj do tro okupata mi estos pro ili. Mi renkontis la esperantistojn nur unufoje post tio,

kaj ili informis min ke forta esperanto-grupo fondiĝis en la urbo Zaoĝuang (Zaozhuang), ĉar kelkaj eksstudentoj de Profesoro Liu starigis Esperanto-klubon tie.

Nu, mi opinias ke mi tre bonŝance trovis la samideanojn en Ĝinano, kaj montris al miaj kolegoj en la universitato ke esperanto ja valoras kiel internacia lingvo. Fakte ili tre miris

komparante la tempon kiun oni bezonas por bone lerni la anglan lingvon kontraŭ la tempo por lerni Esperanton. Bedaŭrinde la bezonon lerni la anglan pelas ekonomiaj tialoj.

Se iu el niaj legantoj ĝuos oportuon vojaĝi en Ĉinujo, nepre iru laŭ Ĝinano. Tie vi trovos plej gastigeman grupon de samideanoj.

[Represita, kun lingvaj korektoj, el *Esperanto en Melburno*, decembro (?) 2007] □

Interesting Titbits From Around the World

- *In May, Lithuania* will host the first world-wide Congress of Esperantist Journalists, under the auspices of the Lithuanian Journalists' Esperanto Association, with a grant from the Lithuanian Journalists' Association.
- *December 12, 2007*, saw the inauguration of "Akvo-ok" ("Water-8"), in Herzberg, Germany. "Akvo-ok" is an educational walking path around the Lonau and Sieber river streams, with some 20 information signs about local history and ecology. Each of the signs includes a summary in Esperanto. As far as is known, this is the first educational walking path in the world to be signposted in Esperanto.
- **N-ro 48 of the 16 page *Familia Esperanto*** can be downloaded for free from the Net, at http://uea.org/rondo_familia/index.html. It concerns the use of Esperanto in the home; using Esperanto as a family language; and special international meetings for Esperantist families and children.
- *Claude Piron*, one of the most prominent Esperanto authors and teachers, died on January 22 this year. Apart from his writings in promotion of Esperanto, he was also the author of a popular series of detective novels in Esperanto, under the pseudonym of Johán Valano (and also Johán Balano). As a psychoanalyst, he, along with your editor (also a psychoanalyst) helped in revising G. Patureau's translation into Esperanto of Sigmund Freud's *Kompendio de psikanalizo*, the only psychoanalytic work of any school currently available in Esperanto. The following three photos of Claude Piron, taken in 1979, were contributed by our member Nicole Else:



Claude Piron teaching (1979)



Claude Piron with Guitar



Eating fondue, with his wife



A more recent photo
(2005, from the Net)

- *Don Harlow* is another major Esperantist in the literary field who died recently (January 27, 2008), at his home in Martinez, California. While in high school, his school sent him to Denmark as an exchange student. There, he visited an Esperanto club, to hear how the language sounds. As he listened to a Japanese Esperantisto, Iroo Eizo, he felt he could see how Esperanto could well function as a world-wide language. Later, in London, he became acquainted with such major figures as Ivo Lapenna, Nikolaj Rytjkov and John Wells. We plan to publish a full obituary of Don Harlow in *ESK* 93.

- *A major document on how language education should be conducted in Europe* is now available on the Internet in many languages. The Esperanto version can be found at <http://www.edukado.net/pagina/REFER-ENCKADRO/18364/> While the situation in Europe is far removed from us, and in general, the Asia-Pacific area, many Australians have European roots, and there is little or no consensus between the education authorities in the Australian states on the matter of language education. For this reason, the detailed document referenced above may be of considerable interest. The text, first compiled in 2001, is several hundred pages long.

While you are looking up this document you may also be tempted to look at the home page of www.edukado.net, where many other educational materials can also be found.

- *Switzerland has long played a major role* in the movement for an international language. In the latter part of 2007, a monumental encyclopaedic work by Andreas Künzli: *Universalaj Lingvoj en Svislando* was published. Costing 66 Euros this 1129 page book is unlikely to be found in many private homes, but historically minded libraries may find it useful for research. □

Ni pri ni, oni pri ni de Katja Steele

Krom sur la paĝoj de *ESK* ni kelkfoje legas artikolojn pri la aŭstralia esperanto-movado ankaŭ en la eksterlandaj esperanto-eldonaĵoj. Tia estis lastatempe la mallongigita historio de la esperanto-instruado en Perto, kiun povis legi la abonantoj de *Internacia Pedagogia Revuo* 4/2007 (la plena artikolo aperis en *ESK*).

Ne ofte, sed tamen aperas pri-esperantaj artikoloj ankaŭ en la anglalingvaj publikaĵoj de Aŭstralio. Nekutime bonkvalita ekzemplo pri tio estas la tutpaĝa verkaĵo de Larissa Dubecki en la ĵurnalo *The Age* (15.12.2007).

Por ke tiaj artikoloj ne restu nerimarkitaj, sed estu vaste konataj kaj


laŭeble uzataj por niaj celoj, mi petas vian kunlaboron por kolekti ilin. Mi pretas akcepti eltondaĵojn el diversaj revuoj, ĵurnaloj ks. (kun indiko pri la nomo de la periodaĵo kaj dato de ĝia aperigo). La liston de la kolektitaĵoj kun eventuala priskribo de la plej gravaj el ili mi publikigos en la numeroj de *ESK*. La fina loko de la kolekto estu la onta Esperanto-biblioteko-arĥivo, pri kiu laboras nun Barrie Cledsmith. Mi restos en daŭra kontakto kun li tiel ke li, paralele kun nia surpapera kolekto, zorgu pri la enkomputila arĥivado de la sama materialo.

Katja Steele

<steelek@myway.com>



• Interrete

- **Multaj retpaĝoj en Interreto donas listojn** de neatentitaj kaj tre utiligindaj retaĵoj esperantaj. El ili mi rekomendas <http://www.alexia.com/browse?&CategoryID=486>, kie eblas trovi listojn de listoj de alie nefacile troveblaj esperantaĵoj. — 

- **Kiel trovi nur esperanto-lingvajn retpaĝojn per Google:** uzu la adreson: http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo, kiu ebligas serĉi en proksimume tri milionoj da esperantolingvaj retpaĝoj. [laŭ *Ret-info*]

- **LERNU!** — Antaŭ kvin jaroj, la 21an de decembro 2002, lanĉiĝis www.lernu.net, la retpaĝaro por lern-

ado de Esperanto kaj informiĝo pri ĝi. Tiam ĝi enhavis enkondukon, bazaĵn gramatikoklarigojn, tri kursojn, etan bibliotekon, vortaron, babililon kaj ne multon pli. La enhavo haveblis en sep lingvoj.

Dum la lastaj kvin jaroj la paĝaro kreskis kaj multo ŝanĝiĝis, sed la bazaj celo kaj ideo restis samaj — senpage helpi al ĉiuj retuzantoj en la mondo lerni kaj ekuzi Esperanton laŭeble facile kaj rapide. Ke ĝi almenaŭ parte atingas tiun celon montras la fakto ke inter la plej aktivaj projekto-kunlaborantoj troviĝas tiuj kiuj mem lernis la lingvon per **LERNU!** kaj ke apenaŭ eblas partopreni en iu Esperanto-aranĝo sen renkonti novulojn

kiujn **LERNU!** venigis al la movado (se vi ne jam spertis tion, demandu venontafoje kelkajn komencintojn, kiel ili lernis Esperanton).

lom da ciferoj

LERNU! nun havas pli ol 100 000 vizitojn monate, iom pli ol 43000 registritajn uzantojn (185 registriĝis dum 2002, 3684 dum 2003, 6505 dum 2004, 7671 dum 2005, 9822 dum 2006 kaj pli ol 15500 dum 2007) kaj kelkajn dekojn da helpantoj kiuj tradukas la paĝaron, lingve helpas uzantojn, plibonigas vortarojn, kontribuas enhavon, testas, programas, komentas kaj en multaj aliaj manieroj certigas ke la projekto floras kaj evoluas. Nombro de malsamaj paĝoj en la paĝaro kalkuliĝas en miloj kaj nombro de lingvoj en kiuj ĝi haveblas estas pli ol 30 kaj daŭre kreskas! 15 kompletaj kaj partoj de du pliaj kursoj kovras tre malsamajn nivelojn kaj metodojn de perreta lingvoinstruado.

Pri la enhavo

Krom kursoj kaj pure instrua materialo, kiel diversanivelaj gramatikinstruoj, ekzercoj, testoj kaj ekzamenoj, ĉe **LERNU!** ekzistas pluraj iloj por uzado de la lingvo kaj komunikado, ekzemple mesaĝsistemo, bildokartoj, forumoj, virtuala klasĉambro, tujmesaĝilo kaj biblioteko kun ekzemploj de origina kaj tradukita literaturo, artikoloj el 13 malsamaj gazetoj, tekstoj pri la lingvohistorio kaj la movado, kolekteto de Esperanto-muziko, filmoj, ŝercoj kaj zamenhafa proverbaro. Enhavon de kursoj kaj ekzamenoj kontrolas la Akademio de Esperanto, kaj unu el la akademianoj estas en la kerna teamo de la projekto.

Pli da informoj

Pli detalajn informojn okaze de ĉi tiu ĝojiga jubileo kun fotoj, bildoj kaj ligiloj, vi trovos ĉe http://eo.lernu.net/pri_lernu/informiloj/artikolo.php. Por ke la projekto plu evoluu same vigle kiel ĝis nun, helpo ĉiam estas bezonata kaj bonvena.

Se vi ŝatus iel helpi, ĉu praktike, ĉu finance, ĉe http://eo.lernu.net/pri_lernu/subteno/index.php vi trovos la necesajn informojn. Vi ankaŭ estas ĉiam bonvena kontakti nin ĉe <teamo@lernu.net!>

Dankoj

Laste, sed ne malplej grave, grandan dankon al ĉiuj diversspecaj helpantoj, individuoj kaj organizoj, kiuj kunlaboris pri la projekto dum la lastaj kvin jaroj kaj eĉ pli longe! Sen ili, **LERNU!** ne estus tio kio ĝi estas hodiaŭ. Apartan dankon al ESF, por granda financa subteno, kaj al E@I, por konstanta kaj diversmaniera praktika subteno. Amike, ĝoje kaj danke salutas, la teamo de **LERNU!**

.....

- *La podkasto* ĉe <http://www.zer-vic.com/chitienun> [*Ĉi Tie Nun*], kiu en epizodo 032 (3/03/2007) enhavas video-formon kaj ne nur parolon, vere povas ridigi vin — serio de bizaraj fotoj pri eventoj realaj aŭ imagitaj, kun komentoj.

- Ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=pyb4I4gk4hk> videblas ne-longa video pri la Esperanto-kongreso en Aŭklando. Ĝi estas tute en la angla lingvo, kaj la komentantino komencas per parolado kies ĝenerala enhavo estas “Esperanto fiaskis”. La

video donas impreson ke Esperanto estas fiaskinta hobiaĵo nun uzata. Igor Couto kaj unu-du aliaj personoj laŭdas la utilon de Esperanto, sed la moka tono de la komentantino lasas tre malbonan guston.

Ankaŭ videblas ĉe *YouTube* video kiu anoncas sin kiel videon pri Roterdamo kaj la UK 2008. Tamen ĝi prezentas nur fotojn de Roterdamo, kun

tute neniu mencio pri Esperanto aŭ la UK, kaj akompanas ĝin kanto plene anglalingva sen rilato al la UK aŭ al Esperanto. **Domaĝege!**

• *eLibroj, parolantaj libroj, kaj kantoj en kaj pri Esperanto, senpage elŝuteblaj:* interesa listo troveblas ĉe <http://www.archive.org/search.php?query=Esperanto&server=se> □



• **El la regionoj/Local News**

NSW: Yesterday [Dec. 15] we had a really great Zamenhof-Tago in Redfern. I'd say in excess of 50 attended representing all ages. Anthony Gaskill did his usual fine job of MC-ing despite illness striking of late. The Murphy puppets were a big hit as was Tim and Yaw's sketch. Roger's bagpipes attracted additional attention from passers by and Igor's mum (Marlene) and friends together with Edith from Colombia whose kids are

still stuck in South America provided delicious delightful and delectable refreshments. Various countries were represented — France and Germany come to mind because it's so pleasing to see people from those formerly internee lands *really* cooperating. I had the honour to present the Festo-Parolado. Seven Sydney Baha'is attended, four of them Esperantists.

[Reporter: Paul Desailly]

.....

Marcel Leereveld : Naŭdekjarulo de Franciska Toubale

Estas por ni granda privilegio havi vintan ekzemplon ke kronologia kaj psikologia aĝoj malsamas, ke maljuniĝi ne aŭtomate signifas perdi siajn kapablojn, sed male permesas kompreni la evoluon de nia socio kaj profundigi sian konon de la homa koro. Marcel Leereveld malavare dividas siajn spertojn kun ĉiu ajn kiu pretas lin aŭskulti kaj volonte uzas sian humuron. Ĉu povus esti pli bona oportuno ol lia naŭdekjariĝo por danki lin kaj sciigi al li kiom gravas al ni lia

apudeco?

En granda sekreteco estis preparita semajnfino da ĝojelmonro la 2an kaj 3an de decembro 2007. Heather Helzingen kompetente organizis kaj kunordigis la programon, kun la “komplikeco” de Attica, nepino de Marcel.

Ĉiu longe memoros la grandajn okulojn kaj duonmalfermitan buŝon de ambaŭ, Marcel kaj Alida, kiam ili eniris la grandan belan salonon de la ĉevalkonkursa restoracio en Caulfield

kaj ekvidis ne nur la atenditajn parencojn, sed longan vicon de trideko da esperantistoj alvenintaj el W.A., S.A., NSW kaj kompreneble Viktorio, kantantaj por li je la sakfluto de Roger Springer. Post pluraj rigardoj de la dekstro al la maldekstro li komencis individue saluti ĉiujn ĉeestantojn, ridetante, malgraŭ la ĝeno de dentodoloro ĝuste je tiu tago.



Dum la diversaj manĝopaŭzoj estis montritaj per komputilo fotoj pri la vivo de Marcel kun Alida, iliaj infanoj kaj multaj gravaj esperantistoj. Max Wearing emociite parolis pri la tempo de la somerkursaroj en Adelajdo, kiam Marcel estis insiste petata kiel instruisto, pro lia senkonceda analizo de la gramatiko de Esperanto. Kun okulumado al Marcel, Franciska Toubale prezentis eltiraĵojn de la teatraĵo de Eve Ensler *La Monologoj de la vagino*, verko bazita sur intervjuoj de pli ol ducent virinoj. Dot Bysouth kaj Franciska Toubale unue kune ludis la ritmon Griot el Burkina Faso per tamburo de okcidenta Afriko nomita *djembé*. Poste Dot disdonis diversajn perkutinstrumentojn por ke la aŭskultantaro povu aktive preni parton. Tiam Leonie Heldzingen ekstaris, sperte kaj elegante

dancis ventran dancon laŭ la ritmo. Sekvis momento da komuna improvizado, kiu altiris rideton de kontento sur ĉies lipoj.

Kun la kuko venis la gratulmesaĝoj ne nur el Aŭstralio, sed el la tuta mondo. Mi citu interalie Renato Corsetti-n, Anna Löwenstein-on, Kep Enderby-n, Ron Gates-on. Venis eĉ poemo de kamarado de la junaĝo de Marcel el Nederlando. DVD el Adelajdo estis lasta en la lavango da bondeziroj.

La ĝardeno Pirianda en la montaro Dandenong estis elektita por la dimanĉa komuna pikniko. Tie estis plantitaj de la unua posedanto neordinaraj arboj. Marcel same faris en sia ĝardeno, ĉar li multe interesiĝas pri arboj. La plej kuraĝaj spite la krutaĵojn kaj varmon sekvis la spertulon Bernie Heinze, por malkovri la trezoron de tiu ĝardeno.

Lundon, la vizitantoj kiuj povis resti iom pli longe en Melburno, venis al la radiostacio de 3ZZZ por rakonti pri sia rilato kun Marcel kaj iom paroli pri la nuna stato de Esperanto en sia ŝtato.

Tiu neforgesebla festo revigligis la fidon al Esperanto de multaj ĉeestantoj kaj estas promeso de estontaj tiaj renkontoj. □



Marcel Lereveld and the Esperanto Summer School in Adelaide 1989-97

by Max Wearing

Marcel came to us with a formidable reputation as the man who'd taught Esperanto in a prestigious Tasmanian grammar school and had it accepted as a matriculation subject — also as an Esperantist with a world reputation for debunking ill-considered temptations to sully the pristine simplicity of Zamenhof's masterwork.

We were warned, of course, that he was far too old to teach. He was 72 — an age by which teachers should be dead or long-since retired.



Marcel ĉ.
1990

At 72, the only indication that Marcel had passed his allotted 3 score years and 10 was his abundant shock of snow-white hair.

Otherwise he could have passed for a lean and sinewy marathon runner half that age. When we programmed him to teach three hours each morning and be free for the rest of the day, he protested vehemently. He had not travelled all the way from Melbourne for a teaching load like that. He declared his intention of devoting every waking minute to helping the Esperanto learners we had collected from all round the country to hear, learn, and practise Esperanto.

He carried out this intention. Whenever we went on an excursion, he was there to give an Esperanto commentary. In the evenings he presented Esperanto talks of his most recent travels in rough, primitive, and

exotic lands. He led outdoor soapbox forums, debates and story-telling sessions with charm and vigour. The suggestion that he was too old to teach was obviously bunkum.

It was with great reluctance that he finally consented to accept the \$1,000 travel and accommodation allowance that we allocated to each of the principal tutors in those days. Scorning luxuries like air travel and free accommodation in the college, a hotel, or the home of a local Esperantist, he chose to drive and sleep in his own motor van — even in Adelaide's sweltering heat.

From the very beginning, school participants appreciated his systematic presentation. He insisted on their bringing to class each day a set of coloured felt pens for indicating the grammatical category of each and every word. Instead of allowing his students to passively and uncritically soak up items of vocabulary, he trained them to be always on the alert and protect themselves against unnecessary neologisms — “*necesaj novvortoj*” (not “*neologismoj*” — since “*neologismo*” was itself a “*necesaj novvorto*”). He held up an Esperanto-dictionary and declared that at least half of its entries were unnecessary “*novvortoj*” to be identified as such and avoided. Why use “*denove*”, for example, when “*refoje*” and “*ree*” are already made up from basic word-elements? Why use “*par-*

ki” or even “parkumi” when the root “park-” has nothing to do with motor vehicles? (Anyway we can use “restigi”).

Nevertheless, it was not only the clear and systematic nature of Marcel’s teaching that made him the teacher most often demanded by students. As my wife, Beth, has put it: “Marcel is by nature and breeding one of the most courteous, kindly and considerate men that most of us ever get to meet.” What’s more, it’s not only towards women that he shows these respectful qualities. In the early days of Esperanto Summer Schools in Australia, many of its participants were monolingual, geographically isolated and middleaged — not the best set of requirements for rapidly learning your first foreign language. Marcel was always kindly and considerate towards such students and beginners.

For many years the majority of Australia’s most proficient speakers of Esperanto were migrants from Euro-

pean countries — the generation that suffered most from such xenophobic taunts as “Can’t you speak English?” or “Don’t you talk bloody Australian?” One can understand the temptation for some such migrants to persecute English-speaking students of Esperanto not yet fluent in it. Marcel was not one of these. He was unfailingly patient and compassionate towards his students and they loved him for it.

In my earliest years in Esperantujo, one often heard Australian newcomers to Esperanto declaiming to one another as one of their first expressions in the new language: “Nay croaker deeloo! Nay croaker deeloo!” They were not students of Marcel Leereveld’s. High on his list of unnecessary neologisms is “krokodili” used as part of a xenophobic Esperanto reprimand. He’s a real good mate, and we wish ‘im a long and happy retirement. □

.....

Forpasis bona esperantisto kaj instruisto

de Margaret Chaldecott

Sylvia Burkitt forpasis. Dum la dua mondmilito ŝi servis en la aŭstralia armeo kiel deĉifrantino en Novgvineo, kie ŝi aŭskultadis al mesaĝoj japanaj, sed devis resti pri ili silenta.

Iun vesperon, kiam la forpasinta James Harwood alportis kelkajn erojn el sia muzeo telegrafia al Redfern, ŝi tuj senerare eltajpis mesaĝon per morsa alfabeto.

Laŭ mia memoro Arturo Cocking intervjuis ŝin por la lasta paĝo de *The Australian Esperantist*.¹ Eble an-

¹ Domaĝe, ne. Mi traserĉis ĉiujn numerojn de *The Australian Esperantist* 1988, red. Herbert Koppel, kaj neniu tia intervjuo aperis en tiu nia revuo tiujare. Rapida traserĉo de antaŭaj numeroj (kiel ankaŭ de la numeroj redaktitaj de mi — ekde 1989) simile estis senrezulta. [d]

koraŭ restas ekzemplero en Redfern.

Ĉeestis la funebran ceremonion 30-40 homoj. Mi estis la sola esperantisto tie, kaj mi surhavis mian etan verdan stelon. Ŝia bona amikino el Adelajdo diris: “Ho, tial estas tiom da verdaj steloj sur la ĉerko, kiel ankaŭ la aŭstralia flago.”

Post tio ni ĉiuj iris al ekssoldata klubo, kie ni parolis unu kun la aliaj.

Ŝi estis tre rimarkinda virino. Ŝi amis la armeon, naturon, ŝpinadon kaj teksadon. Iam ŝi faris al mi ŝalon el i.a. hundaj haroj. Multaj el ŝiaj amikoj ricevis tian ŝalon.

Ŝi estis bona instruisto de Esperanto, kiun ŝi amis. Bedaŭrinde pli

poste en sia vivo ŝi fariĝis pli kaj pli forgesema.

Iu voĉlegis mallongan travivaĵon el ŝia vivo. Ŝi estis montranta tekstechnikon al iu. Tiam eniris ŝia edzo dirante ke ŝarko mordis lin en la rivero Parramatta. Diris ŝi ke ŝarkoj ne havas dentojn. La akraĵo en iliaj buŝoj estas skvamoj ŝanĝiĝintaj. Kiam elfalas unu, alia elkreskas. Ĉu ne estas bone scii, ke ŝarkoj kaj fiŝoj troviĝas ankaŭ en la rivero Parramatta? Ŝi estis ĉiama naturamanto.

Iuj manlianoj memoras ŝin. Volo kaj mi estas la solaj membroj konintaj ŝin ĉi tie en Redfern.

[el *Tamen Plu* februaro 2008] ◻

Nekrologo – Frank Swift

15 februaro 1930 ĝis 29 decembro 2007

verkita de Erin McGifford



Frank naskiĝis en Londono, Anglujo. Li havis frat-inon, kiu nun loĝas en Usono, kaj frato, kiu loĝas en Francio. Alia frato jam mortis.

Frank venis al Nov-Zelando kaj aliĝis al la armeo. Tie li renkontis Majoron Petersen-on kaj eble lernis Esperanton de li. En 1963 Leŭtenanto Frank Swift estis sekretario/kasisto de la Esperanto-klubo en la Armea Kampadejo Waiouru.

Frank diris al ni kelkajn rakontojn pri siaj traviv-spertoj en la armeo. Iufoje juna soldato subite ne povis el-

teni la streson de sia okupo kaj komencis minaci siajn kunulojn per pafilo. Frank eniris la ĉambron kie estis la junulo — kaj tio bezonas kuragon! — kaj milde kaj bonkore parolis al la junulo ĝis li trankviliĝis. Mi admiras Frankon pro tiu agmaniero.

Frank translokiĝis al la Armea Kampadejo Burnham, proksima al Christchurch, ĉirkaŭ 1964, kaj starigis tie Esperanto-klubon. Li edziĝis, sed la geedzeco ne longe daŭris. Li eliris de la armeo ĉirkaŭ 1965 kaj fariĝis bakisto, sed baldaŭ forlasis tiun okupon kaj komencis labori por la urba konsilio de Christchurch. Tie li restis ĝis li enmeritiĝis ĉirkaŭ 1995.

Kiam li ekloĝis en Christchurch, Frank aniĝis en la Christchurch-a Es-

peranto-Societo. Je tiu tempo Frank havis sveltan nigran hararon, tute malsimilan al la blankaj hararo kaj barbo de liaj lastaj jaroj. Frank estis flua Esperantisto kaj fidela membro de la Christchurch-a klubo. Estis ĉiam plezuro kiam Frank alvenis niajn kunvenojn per sia antikva biciklo, portante sian bonhumoran kaj amik-ecan mienon kaj optimisman sinten-on.

Frank rolis en diversaj jaroj kiel komitatano, sekretario, kasisto kaj prezidanto. Li ankaŭ entuziasme partoprenis en kelkaj teatraĵoj kun Dave Dewar kaj mi. Li bone rolis kiel kanajlo en tiuj drametoj.

Frank ankaŭ estis bona membro de NZEA, kaj faris grandan financan kontribuon al NZEA per la Fonduso Frank Swift por la disvastigo de Esperanto inter junuloj. Antaŭ kelkaj jaroj li ankaŭ donis monon por esea konkurso por lernantoj. Li vizitis per

biciklo dekojn da lernejoj en Christchurch por disdoni aliĝilojn por la konkurso.

Frank estis dumviva membro kaj delegito de la Universala Esperanto Asocio, kaj ĉeestis Universalajn Kongresojn en Adelajdo (1997) kaj Berlino (1999). Li ankaŭ bone parolis la germanan lingvon. Li ĉeestis kelkajn kongresojn kaj somerlernejojn en Aŭstralio.

Frank estis 77-jaraĝa kiam li mortis. Li sciigis la Christchurch-klubanojn kelkajn monatojn antaŭ sia morto, ke li havas seriozan limfan kanceron. Li ĉeestis nian zamenhofan kunvenon en decembro, kaj kelkajn tagojn poste mi lastafoje vidis lin. Li tiam diris: "Morti, tio ne ĝenas min. Mi ĝuis kontentigan kvanton da jaroj."

Ni, kiuj restas, malĝoje adiaŭas, sed memoras kun plezuro bonkoran samideanon. □

.....

Ĉu vi deziras instrui en Ĉinio?

Mi estas ĉina esperantisto kaj laboras en reta *El Popola Ĉinio* (www.espero.com.cn) kaj estas redaktoro de www.raporto.info

Mi nomiĝas Li Jianhua kaj mia esperanta nomo estas Bluaĉielo.

Unu el miaj amikoj laboras en altlernejo en Hunan-provinco en meza Ĉinio, kaj ili bezonas 3 instruistojn pri la angla lingvo.

La kondiĉoj estas:

- La altlernejo provizas loĝejon en la altlernejo.
- La salajro de la instruistoj estas

ĉirkaŭ 800 usonaj dolaroj monate.

- La instruistoj devas posedi universitatan diplomon kaj jam esti laborintaj pli ol du jarojn.

Ĉu vi aŭ viaj amikoj volas veni al Ĉinio por instrui la anglan lingvon?

Se jes, bonvolu sendi al mi epoŝtan mesaĝon per esperanto aŭ la angla lingvo.

Mi tre ĝojos se mi ricevos vian leteron. Koran dankon!

Ĉion feliĉan kaj bonan sanon!

Amike via Bluaĉielo (Li Jianhua)

<bluacxielo@163.com> □

Esperanto Courses for Beginners Esperanto-kursoj por komencantoj

- 6 week course — Tuesdays 6-7:30 pm
- Starting 5 February 2008 (and 8 April 2008)
- In the group study room at the City Library, 253 Flinders Lane, Melbourne
- Teachers: Jennifer Bishop and Miranda Lutz
- \$30 to cover materials
- Please email for further information:
<melbourne@esperanto.org.au>
- 6 semajna kurso — Marde 6-7:30 pm
- Ekde 5 Februaro 2008 (kaj 8 Aprilo 2008)
- En la grupa studoĉambro ĉe la Urba Biblioteko, 253 Flinders Lane, Melbourne
- Instruistoj: Jennifer Bishop kaj Miranda Lutz
- \$30 por lernaĵoj
- Bonvolu retroŝti por pli da informo:
<melbourne@esperanto.org.au>

.....



Spring Creek Community House, Torquay

La Torquay Esperanto Kafo Klubo ĝis Novembro kunvenos ĉe la Spring Creek Community House — 14 Price Street, Torquay, de 1pm ĝis 3pm.

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajp-itaj per freŝa rubando. Fotoj devas esti 300dpi.

Limdato por la marto-aprila numero: 5a de aprilo 2008

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiuj tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto sub la Suda Kruco

PO Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

<esk@esperanto.org.au>



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Igor Couto* | <prezidanto@esperanto.org.au>

Sekretario: *Miranda Lutz* | <sekretario@esperanto.org.au>

Kasisto: *Stephen Pitney* | <kasisto@esperanto.org.au>

Membreco: A\$40 por individuo aŭ klubo [+ A\$6 por familiano(j)
ĉe la sama adreso]

Por studento aŭ pensiulo: A\$25. Asocia membreco: A\$12

Membrecpagojn sendu al <sekretario@esperanto.org.au>

La Novzelanda Esperanto-Asocio

PO Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando

<nzea@esperanto.org.nz>

<http://www.esperanto.org.nz/>

Telefono: 0800 350 781

Prezidanto: David Ryan | <ryangomez@xtra.co.nz>

Kasisto: Don Rogers | <don-cles@ihug.co.nz>

Sekretario: Bradley McDonald | <bradley.m@xtra.co.nz>

Membreco: NZ\$40 por individuo, NZ\$50 por geedza paro; NZ\$10
por studento aŭ junulo <20-jara. Klubo: NZ\$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la kasisto ĉe la asocia adreso

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

Marto-Aprilo 2008

if undeliverable return reply paid to
D. Broadribb • P.O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

PRINT POST
PP631048/0005